

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 41-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2017 N-ro 167

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt.*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

TUTTAGE SUB ESPERANTA ATMOSFERO

En la 6-a de aŭgusto 2017, okazis la 1-a Esperanta Renkontiĝo de ‘Juiz de Fora’, urbo el la sudorienta ŝtato ‘Minas Gerais’, Brazilo.

La enhavo de la programo de la aranĝo konsistis el prelegoj, informoj, spektado de E-videoj kaj aŭskultado de opinioj de kelkaj e-istoj, E-minikurso kaj distribuado de inform-materialoj, destinitaj tiel al komencantoj kiel ankaŭ al komencintoj.

Profesoro d-ro José Passini prelegis pri tio, kio estas E-o, kaj cetere komentis kelkajn personajn kaj profesiajn travivaĵojn kaj kuriozaĵojn ĉiam rilatajn al E-o.

Poetino Maria Nazaré de Carvalho Larooca prelegis pri la movado esperantista kaj prezentis serion da avantaĝoj, kiujn havas tiuj, kiuj sin dediĉas al la lernado de la internacia lingvo, ĉefe la eblo koni la mondon per malpli da elspezoj ol ordinaraĵoj turistoj.

Instruistino Ângela Faria gvidis rapidan kurson de Esperanto. Ŝi tuŝis la bazajn gramatikajn lingvo-nociojn.

Fine de la evento estis bankedo, dum kiu oni povis malstreĉiĝi kaj kunfratiĝi: ĉiuj kunkantis kaj estis iel lulitaj de la marŝeto komponita de Maria Nazaré de Carvalho Larooca, titolita ‘Dankon, Zamenhof!’; sube transkribita:

“DANKON, ZAMENHOF KARA!

Koran dankon pro Esperanto!
Tia mirinda ŝlosil,
Kiu malfermas
La koron de l’ homar’...

Dankon, nia Majstro kara!
Koran dankon pro Esperanto!
Nia bela lingvo internacia
Per kiu ni povas kunvivi en fratar’!”



Prof. José Passini

AMIKOJ DE LORENZ

Álvaro Mota, unu el la plej aktivaj brazilaj esperantistoj en la neŭtrala movado, ano de la Konsilantaro de nia Eldonejo, verkisto de Almanako Lorenz, konstanta preleganto en la Universalaj Junularaj Kongresoj de Esperanto... Vera homarano! Álvaro, sendube, estas Amiko de Lorenz! Koran dankon, kara frato!



Malĝojo estas kaŭzo de sufero. Ne vin ligu al ĝi, nek permesu, ke ĝi infektu vin per siaj toksaĵoj.

Certe ne ĉiuj tagoj estas helaj kaj riĉaj je ĝojo.

Estas okazoj en kiuj la sufero ŝajnas venki la pecojn de via agado. Tamen, ekzameninte la malfacilaĵojn kaj sentinte la dolorojn, ekfaru intiman sunon, kiu forpelu la malĝojon el via menso, por ke vi pli facile venku la provajn okazaĵojn.

La kulturo de malĝojo malfermas vojon al pluraj malsanoj de la menso, de la emocio kaj de la korpo.

(Fonto: "Vivo Feliĉa", de la Spirito Joanna de Āngelis, psikografita de la medio Divaldo Pereira Franco)

REDAKCI-ARTIKOLO

Karaj gelegantoj, Unu fojon pli, ni salutas vin, karaj gesamideanoj el la grenplantejo de la bono, kundividantaj informojn kaj ofertantaj kelkajn tekstojn plenajn je saĝo kaj arto.

Speciale ĉi-eldone, krom la prozaĵoj, ordinare aperantaj en nia 'Komunikoj', ni dediĉas apartan lokon ankaŭ por la poezio, ĉar la arto de la skribo ade akompanas la spiritojn plej progresintajn jam de la eko de la homaro.

Ni esperas, ke vi kunĝuu la enhavon. Plie, ke ĉi-bulteno iĝu ia ĉenero kunliganta vin kaj la anojn el Societo Lorenz, kio, laŭ Zamenhof, kontribuas por la estiĝo de iu granda rondo familia!

Bonan legadon!

Ni ricevis kaj rekomendas

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

<https://translate.google.com/>

PLENUMITA 19/01/2017 Tricentkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@irog.com.au

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

SENDATA AL 305. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 41-a – n-ro 167 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2017

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 12.(24.) VI. 1889 (o.v. V-72)

Estimata amiko!

El la urboj pri kiuj vi demandis, esperantistoj ekzistas en Tomsk, Vladivostok, Tiflis, Batum, New-York; pri la ceteraj urboj mi povas al vi nenion diri, ĉar de tie mi ne ricevis ankoraŭ promesojn.

De s-ro Sveŝnikov el Saratov mi ne ricevis leteron; sed inter la promesintoj “senkondiĉe” sin trovas unu Sveŝnikov (ankoraŭ de la pasinta jaro) el Vjatka: ĉu tiu ne estas la sama?

Mian karton fotografan vi nenie ricevos; sed post kelka tempo mi intencas min fotografi, kaj tiam mi sendos al vi mian fotografajon.

Pri ĵurnalo vi jam ne devas peni, ĉar vidante kiel malfacile ĝi estas en nia lando kun ĵurnalo, mi jam forĵetis mian intencon. De la monato Aŭgusto komencos eliradi ĵurnalo en Nürnberg, sub la redakcio de sinjoro Chr. Schimidt kaj mi promesis esti la ĉefa redaktoro de tiu ĵurnalo.

En tiu ĉi letero vi trovos eltranĉon el la Londona ĵurnalo “Athenaeum”. Sinjoro Max Müller tie presis vian leteron al li, kaj kun granda surprizo mi vidis, ke vi salutis kaj dankis lin en mia nomo! Mi tute ne volis kaj mi neniam volus danki s-ron Max Müller por la sola legado de mia gramatiko, ĉar tia danko povus min fari ridinda en la okuloj de la tuta mondo kaj multe malutile al nia afero! Mi petas vin tre kore neniam uzi mian nomon sen mia scio, ĉar de tio ĉi povus naskiĝi grandaj malagrablajoj por mi kaj por nia afero! Tiel ekzemple se vi ankaŭ al la Granda Princo diris ke mi lin salutas aŭ io simila, vi povas enkonduki min kaj nian aferon en grandaj malagrablajoj. Ĉio kion vi faras, mi petas vin fari en via propra nomo.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

Evoluado

Antonio Felix da Silva¹

“En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio” (Jo 1.2).

Ĉiu Spirito estas intelekta estulo el la kreitaĵaro. Pro tio, vivi estas la plej bona momento por la evoluado de la homoj. En la komenco, la monado, kiel flamo, vojaĝis tra la spaco ĝis staro apud minerala regno, kie ĝi kuŝis dum miljaroj. Poste, ĝi migris al vegetala regno, kaj miljarojn poste, ankaŭ al animala regno. Do, ĝi fariĝis homo, kiu havas korpon, perispiriton kaj spiriton.

Per sia propra klopodo, la flama monado evoluadis en la skalo de la kreitaĵaro kaj kiel spirito, inteligenta, plena de boneco kaj saĝeco, ĝi serĉas la Kreinton. La amo de Dio donis al ĝi propran vivon, senmortecon, liberecon por elekti siajn vojojn, eternecon kaj eble la ŝancon reveni al Ĝi.

Do, la enkarniĝinta homo sciis, ke ĝi estas la intelekta estulo el inter la kreitaĵaro. Pro tio ĝi devas ade evolui ĝis alveno al la Patro.

Kiel ĝi faros tion? Per inteligentaj agoj kune kun ĉiuj ekzistuloj kaj per boneco kaj saĝeco por plej bona mondo.

La amo de Dio ĉeestas en ĉio; en la naturo, en la lumoj de la luno kaj suno; en la beleco de la floroj, riveroj kaj maroj kaj rideto de la infanoj.

Mi kaj vi marŝas al Dio, unu helpanta al la alia, ĉar en tio konsistas la vivoĉelo.

¹ Emerita militisto, vic-delegito kaj fak-delegito de UEA (instruado, verkado, armeo) kaj ankaŭ vic-prezidanto de Esperanto-Asocio de Florianópolis.

SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al editora_lorenz@uol.com.br



FORPASO DE JOSÉ SARAIVA MATOS

AKTIVULO EN LA MOVADOJ SPIRITISMA KAJ ESPERANTA

Eurípedes A. Barbosa



Nia tre estimata frato José Saraiva Matos, preskaŭ 99-jara, tute lucida, ano de Societo Lorenz, forpasis en Salvador, ŝtato Bahia, Brazilo, la 19an de majo 2017. Li estis emerita suboficiro de nacia aerarmeo. Li estis fervora spiritisto kaj multe sindediĉis al tiu ĉi afero. En la komenco de sia spiritisma agado, Saraiva frekventis la institucion 'Kardek-a Instituto de Bahio'. Poste li volontulis ĉe "Mansão do Caminho", kiu estas gvidata de la fama mediumo Divaldo Pereira Franco. En tiu mirinda organizaĵo, liaj filoj kaj genepoj edukigis sub la lumo de la spiritisma doktrino. Saraiva frekventis ankaŭ Spiritisman Federacion de Bahio kaj, dum la lastaj sep jaroj, Spiritisman Centron Gaja Haveno. Saraiva estis tre estimata de la membroj de tiu ĉi spiritisma domo.



José Saraiva Matos

Li komencis lerni Esperanton antaŭ 48 jaroj. Li instruis Esperanton, gvidis la studgrupon Zamenhof, aktivis ĉe Bahia Esperanto-Asocio ekde 1972 kaj verkis la lernolibrojn Baza praktika kurso de esperanto kaj Elementa kurso de esperanto. La 5-an de julio 1983, li kunfondis Esperantistan Societon de Salvador, kiu havis gravan rolon en la loka movado.

Li konis sinjorinon Elísia Martins de Oliveira en 1979, kaj en la sekvanta jaro, ŝi komencis lerni Esperanton, kies baza kurso estis gvidita de José Saraiva. Elísia ne ŝparas laŭdovortojn al Saraiva. Ŝi diris al mi, ke li estis bonkora, inteligenta kaj bonhumora homo, kiu tenis sin tute lucida ĝis la 19a de majo, kiam li mortis.

Saraiva naskiĝis la 10an de julio 1918, en Guaraciaba do Norte, ŝtato Cearao. Li estis fakadelegito de EUA pri spiritismo, krucvortenigmoj kaj kriptogramo, kaj estis ankaŭ ano de Brazila Esperanto-Ligo.

Li ankaŭ kelktempe prezidis Brazilan Konsilantaron de Esperanto, kies bulteno de novembro 1979 publikigis jenon:

"S-ano José Saraiva Matos, nia vicprezidanto, kaj unu El la fondintoj de BKE, nuntempe sukcesis aperigi en la loka gazeto 'Esporte Jornal' kurson pri Esperanto, publikigante la lecionojn. Bona maniero voki la atenton de la neesperantistoj, dank' al S-ro Luiz Eugênio Tarquínio, direktoro de la gazeto. Gratulon!" Saraiva estis poeto kaj membro de la Grupo de Kultur-agado de Bahio, kies bulteno 'Literatura Kajero' publikigis kelkajn poemojn verkitajn de li. Krom poeziaĵoj, Saraiva publikigis ankaŭ dulingvajn kriptogramojn (Esperante kaj portugale). Li esperantigis tekstojn de diversaj kanzonojn, interalie "Mi volis nur lerni Esperanton", "Omaĝe al Esperanto", "La saŭdado nin mortigas", "Palmarbo de Itapoan", "Multa lumo", "La songo", "Bela Maria".

Saraiva kaj Elísia partoprenis plurajn brazilajn kongresojn de Esperanto. Li ankaŭ estis ano de la Legio de Bona Volo kaj multe admiris la agadon de José de Paiva Neto, estro de ĉi-lastata organizaĵo.



José Saraiva Matos inter Amarílio Hévia de Carvalho kaj alia esperantisto, okaze de la 47a Brazila Kongreso de Esperanto, Taguatinga-DF, 2012.



Espерanto estas neŭtrala lingvo ne nur rilate al neaparteneco al iu socia grupo. Ĝia neŭtraleco iras pluen, ĉar ĝi ne havas ligilon kun iu ajn politika ŝtato aŭ nacio.

Saman neŭtralecon oni rimarkas rilate al racia, socia kaj religia aspektoj. En Esperantujo oni lernas ne distingi personojn laŭ haŭtkoloro, socia pozicio aŭ religia kredo. Tia estas la honora starpunkto de esperantismo.

Zamenhof mem ekzempligis la neŭtralecon de Esperanto ek de ĝia naskiĝo, kiam li diris, komencante sian famam festparoladon, en la Unua Universala Kongreso de Esperanto, en Bulonjo ĉe Maro:

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.

Kaj fermante tiun belan kaj viglan poemon, li denove tuŝas tiun saman gravan punkton, ĉi-foje li emfazas la religian toleremon:

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj, aŭ mahometanoj,
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.

Kiel oni facile konstatas, la admono pri la neceso observi neŭtralecon en Esperantujo ne venis kiel konkludo post longa internacia kunvivado. Ĝi aperis en esperanta medio ĝuste en la unua reala momento de vivanta internacia uzado de la lingvo, per la buŝo de ĝia kreinto, kiu parolis unue pri la politika neŭtraleco, kaj due, li ame kaj severe admonis ke oni devas same observi la religian.

La esperanta movado baziĝas sur vera neŭtraleco, facile konstatebla kiam oni legas la Jarlibron. En tiu verko oni trovas anoncojn de bahajismo, budhismo, evangeliismo, hilelismo,

islamo, katolikismo, kristanismo, kvakerismo, oomoto, ortodoksa kristanismo kaj spiritismo.

Krom la nomoj de tiuj religioj, oni rimarkas ankaŭ nomon de societoj pri ekumenismo kaj religi-komparado. Notinda estas la fakto ke ankaŭ por societo pri ateismo estas spaco...

Tiuj religioj kaj societoj aliĝintaj al UEA aŭ al naciaj organizaĵoj rajtas enmeti kadre de universalaj kaj naciaj kongresoj de Esperanto siajn prezentojn pere de prelegoj, solenaĵoj, ritoj, diservoj ktp.

Sed, pluraj religiaj aŭ nereligiaj societoj, kiuj ne estas aliĝintaj al esperantaj organizaĵoj, propagandas siajn aktivecojn kaj doktrinojn uzante Esperanton en pluraj medioj, ĉar tiu lingvo apartenas al ĉiuj. La pordoj de Esperantujo estas malfermitaj al ĉiuj. Estas fakto ke, kiam iu deziras aliĝi la movadon, neniu demandas la aliĝonton pri lia politika deveno aŭ religia kredo.

Esperanto naskiĝis kiel neŭtrala lingvo kaj ni devas zorgeme konservi ĝin tia. Ĉiuj homoj kaj grupoj da homoj sendube rajtas uzi ĝin kiel komunikilon. Kaj ju pli ĝi estos uzata internacie kaj interreligie, des pli da ŝancoj konvinki la mondon pri ĝia utileco.

La saĝaj kaj inspiritaj instruoj kaj ekzemploj de Zamenhof devas fariĝi por ni konstanta zorgo pri la konservado de la neŭtraleco de nia lingvo, malfermante la pordojn de ĉiuj esperantaj organizaĵoj al ĉiuj, ne nur ne diskriminante, sed klopodante krei buntan bukedon da pensoj kaj sentoj.

Sur tia vojo la nuna estraro de Brazila Esperanto-Ligo elkore laboros, garantianta etoson de plena neŭtraleco al la adeptoj de ĉiaj religioj (kaj ankaŭ al la senreligiuloj), kio certe plifortigos nian laboron.

Sur tia vojo la esperanta movado varme laboradas, garantianta plenan neŭtralecan etoson al la adeptoj de ĉiaj religioj kaj ankaŭ al la senreligiuloj.



KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

LORENZ

Memmortiginto

Spirito: Abel Gomes

Mediumo: Francisco Valdomiro Lorenz

Kiam estis li infan' surtere,
baldaŭ faris lin la sort' orfano;
al fremduloj devis li servadi
pro la vesto kaj pro l' seka pano.

Kreskis lia korpo, fortiĝadis,
sed neniu zorgis pri l' animo;
kiam viriĝante, li ekamis,
trafis lin de l' mondo malestimo.

La knabin' amata lin ne amis,
preferante maljunulon riĉan;
la junulo vivis tre malĝoje
kaj malbenis sorton malfeliĉan.

Ne kredante je postmorta vivo,
per armila paf' li sin mortigis;
tre malfrue poste li ekkonis
ke li sin nur pli malfeliĉigis.

Tage, nokte en mallum' li sentis
la ĉeeston de kadavro sia,
ĝian putrodoron kaj la vermojn,
kaj pasadis temp' sen helpo ia.

Li ne vidis la spiritojn bonajn,
kiuj pri li zorgis kun atento,
atendante ke en lia menso
nasku lumo de savanta pento.

Iutage lia konscienco
ekvekiĝis, kaj li petis Dion
pri pardono, kaj patrino lia
venis, portante la savmision.

Li pli poste al la ter' revenos,
kie vizitados lin doloroj,
sed ke li eltenu, al li helpos
de la konscienc' la rememoroj.

(Fonto: *Reformador* (FEB), Nov 1946, p. 268.)

ABEL GOMES naskiĝis en la 30 de decembro 1877 en la urbeto Conceição do Turvo, poste alinomata Senador Firmino, en Minas Gerais. Li elkarniĝis en Astolfo Dutra, alia urbeto el Minas Gerais, la 16-an 1934. Malgraŭ la malriĉeco, li estis memlernanto kaj atingis altnivelan kulturon. Abel estis poeto, muzikisto, preleganto kaj diskoniganto de Spiritismo kaj Esperanto.

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

Perlo: Ostra aŭ Poeta?

Se perlon deziras vi,
Vundu ostron kaj atendu...
Dum nur duon-jarmil'...
Vian flegmon etendu...

Aŭ tuŝu en poet-anim',
Perlajn versojn naskos li
En malpli granda temp-lim'.

Perlo ostra nin beligas,
Beletra nin revivigas...

Pérola: de Ostra ou de Poeta?

Se uma pérola pretendes,
Fere uma ostra e aguarda.
Apenas por meio milênio,
A tua paciência estende...

Ou toca a alma de um poeta,
Pérola-verso ele produz
E em muito o prazo reduz...

Pérola de ostra nos enfeita,
A literária nos deleita...



Aŭtoro: Célio F. Martins - 24/12/2013